

Homaj rajtoj kaj genro-egaleca konsiderado

Charlotte Scherping 2020



Homaj rajtoj




- Normoj pri homaj rajtoj kaj Seksegaleca Konsiderado
- De Egala Salajro al Genro-egaleca Konsiderado en Eŭropo
- Kritikaj perspektivoj pri Seksegaleca Konsiderado



La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj

- Adoptita en 1948
- Respondo al la abomenaĵoj dum Dua Mondmilito
- Enhavas 30 Artikolojn
- Klarigi egalajn rajtojn kaj malpermesi perforton
- Povas esti vidita kiel eŭrocentra

(Unuiĝintaj Nacioj, 1948)



Artikolo 1

"Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduti unu al alia en spirito de frateco."

SEKSEGALECA KONSIDERADO




- krei konscion pri genraj malegalecoj
- Konsideri genron en ĉiuj fakoj de decidado, precipe per la enkonduko de genro kiel temo en la politikon de registaroj

Laŭ la Konsilio de Eŭropo “seksegaleca konsiderado estas la (re)organizado, plibonigo, evoluigo kaj taksado de politikaj procezoj, tiel ke genro-egaleca perspektivo estu integrita en ĉiuj politikoj sur ĉiuj niveloj kaj ĉiuj stadioj, fare de la partoprenantoj normale implikitaj en politikofarado.” (Glosaro pri Genra Egaleco)

La koncepto estis enkondukita dum la Tutmonda konferenco pri Virinoj en 1985 en Najrobio, poste adoptita ĉe la 4a Tutmonda Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Virinoj (1995) en Pekino.

UN Photo/Milton Grant



**SEKSEGALECA
KONSIDERADO**



GENRA EGALECO



- virinoj estas bezonataj en decidaj postenoj, sed tio ne sufiĉas
- diri "ni ankaŭ konsideras genron" ne sufiĉas
- pluraneca perspektivo estas necesa, ĉar viroj kaj virinoj havas malsamajn bezonojn depende de multaj faktoroj kiel aĝo, etneco, seksa orientiĝo, socia statuso, klaso aŭ (mal)handikapo.

EŬROPAJ INSTITUCIOJ

Ne konfuziĝu: La Konsilio de Eŭropo (KoE) kaj la Eŭropa Unio estas du apartaj institucioj

-> Notu, ke la Eŭropa Konsilio kaj la Konsilio de Eŭropa Unio estas ambaŭ organoj de EU



Konsilio de Eŭropo (KoE)

COUNCIL OF EUROPE



CONSEIL DE L'EUROPE

- KoE: "klasika" interregistara organizo
 - **Europe 47 membroŝtatoj**: preskaŭ ĉiuj landoj en Eŭropo
 - 3 plej gravaj valoroj: Homaj Rajtoj, Demokratio, Regado de la leĝo
 - Antaŭenigas sgenran egalecon kiel fundamentan rajton
 - Genro-egaleca Konsiderado

Legu pli ĉi tie

https://eur-lex.europa.eu/summary/glossary/eu_institutions.html

Eŭropa Unio (EU)



- EU: Politika kaj ekonomia unuiĝo
 - **27 membroŝtatoj** kiuj delegis kelkajn el siaj leĝofaraj povoj kaj juĝrajtoj
 - 7 ĉefaj decidaj organoj
 - 6 plej gravaj valoroj

Homa Digno ★ Libereco ★ Demokratio ★
Egaleco ★ Regado de la Leĝo ★ Homaj Rajtoj

SEKSEGALECO EN EU



- 1997/1999 la EU engaĝiĝis en la konsiderado de genro-rilataj en ĉiujn politikajn kampojn (Traktato de Amsterdamo).
 - Ekde tiam genro-egaleca konsiderado ne atingis ĉiujn politikajn kampojn
- efektivigita en dungado, disvolvo kaj esplorado

(Hafner-Burton kaj Pollack, 2009)



Artikolo 119

Egala salajro por egala laboro

Post la unua mondmilito, lobiado de virinaj organizoj enŝovis la postulon pri egala saljro en la tagordon, internaciaj sindikatoj subtenis ilin

La artikolo estis enkondukita ĉar tiu principo jam estis parto de la franca leĝaro

LA KOMENCO:
ARTIKOLO 119 PRI
EGALA SALAJRO



LA TRAKTATO DE AMSTERDAMO 1997

Antaŭenigo de genra egaleco kiel komuna tasko en ĉiuj politikaj kampoj

Artikolo 2: konfirmo de la egaleco inter virinoj kaj viroj

Artikolo 3: aprobo de konsiderado, antaŭenigado de egaleco

Artikolo 13: permesas „taŭgan agadon“ por kontraŭbatali diskriminacion pro seksas kialoj

Artikolo 141: (Anstataŭigas Artikolon 119) Aldono de permeso adopti iniciatojn, kiuj ebligas avantaĝojn cele al la plifaciligo de aferoj por la subrepresentita sekso



EU evoluis de ĉefe ekonomia alianco al unio kie homaj rajtoj ludas gravan rolon.

Politiko determinas la rajtojn: lingvouzo en politiko gravas

Sed la efektivigo de normoj, kiel ekzemple la enkonduko de genra perspektivo, mankas, precipe koncerne la kreadon de konscio kaj la transformo de sociaj procezoj produktantaj malegalecon.

- 
- La celo de genro-egaleca konsiderado estas krei konscion pri genraj malegalecoj: la intersekcio de raso kaj genro ofte mankas
 - Malegalecoj rilate al disvolviĝo: virinoj, kiuj luktaŭ por plenumi la bazajn bezonojn kontraste kun la virinoj, kiuj ĉefe batalas por juraj kaj politikaj rajtoj.
 - La fokuso pri virinoj kiel “duono de la homaro” normaligas duuman partigon de genroj kaj ne reliefigas temojn rilataj al neduumuloj kaj transgenruloj.

INTERSEKCIAJ KAJ POSTKOLONIAJ PERSPEKTIVOJ

(David & Guerrina, 2012) (Allwood, 2015)

- 
- Celo: konsciigo pri genraj malegalecoj
 - Plejparte disvastigita inter bone informitaj fakuloj, pli disvastigi edukadon pri genro-rilataj temoj
 - Ankoraŭ necesas debatoj pri ekonomia kaj socikultura ebleco en la civila socio

LA ESTONTECO DE GENRO-EGALECA KONSIDERADO





KRITIKA PERSPEKTIVO

- Estas multaj diversaj temoj en la tagordo, inter ili klimata ŝanĝo, medio kaj regado.
- EU fokusiĝas sur ekonomiaj faktoroj, kiel ekzemple la virina dungado aŭ la plifortigo de la debato inter la publikaj kaj privataj aferoj, kaj ne sur valoroj
- Fokusiĝo sur la reprezentado de virinoj rilate al decidado anstataŭ sur la efiko de decidoj sur virinoj kaj knabinoj

(David & Guerrina, 2012) (Allwood, 2015)

...EN LA KONSILO DE EŬROPO

COUNCIL OF EUROPE



CONSEIL DE L'EUROPE

"Genra egaleco estas fundamenta rajto. Tamen, ofte okazas ke homaj rajtoj estas malobservitaj surbaze de la genra identeco aŭ de la seksa orientiĝo." (Kompaso, Ĉapitro 5, Sekso)

"Atingi genran egalecon estas centra por la protekto de homaj rajtoj, la funkciado de demokratio, respekto de la jurŝtato, kaj ekonomia kresko kaj daŭripovo". (Strategio pri Seksa Egaleco de la Konsilio de Eŭropo 2018-2023, p. 3).

...EN LA KONSILO DE EŬROPO



- 80-aj kaj 90-aj jaroj: KoE strebis al atingo de virinaj rajtoj kiel parto de sia misio antaŭenigi homajn rajtojn precipe rilate al reprezentado.
- la Konsilio de Eŭropo instigis la partoprenon de virinoj en politikofarado en la EU
- dum EU koncentriĝis pri regiona partopreno, la Konsilio de Eŭropo antaŭenpuŝis la diskuton sur la nacia nivelo

(Lovecy, 2002)

...EN LA KONSILO DE EŬROPO



- 1986: deklaro de virinaj rajtoj kiel homaj rajtoj kaj kreado de la Eŭropaj Ministeriaj Konferencoj pri Egaleco
- Ekde 2012: Programo pri Genro-Egaleco kun Komisiono pri Genro-Egaleco kunmetita de membroj nomumitaj de membroŝtatoj
 - Enlandaj fokuspunktoj en ĉiu membroŝtato
 - Raportistoj en interregistaraj organizaĵoj por reliefigi temojn en la specifa politiko-fako

(Lovecy, 2002), Retpaĝo de la Konsilio de Eŭropo



...EN TEJO



La statutoj de TEJO asertas, ke la organizo laboras por plibonigi la rilatojn inter homoj sendepende de ilia genro. Seksa orientiĝo estis aldonita en 2012 kaj genro kaj seksa orientiĝo en 2019.

...EN TEJO



Egalecen Blog - unua blogo pri feminismo en Esperanto pri kiu laboris pluraj aktivuloj de TEJO
<https://egalecen.org/>.

Fostering Equality in Youth (Florigu Egalecon Inter Junuloj) - Projekto Erasmus+ kun TEJO kiel partnero <https://genraegaleco.tejo.org/>.

Flugfolioj pri atentema kunestado - Rezulto de la antaŭa projekto pri kiel sekure kaj respektive kunekzisti kun aliaj dum renkontiĝoj.

Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO 2018 en Badajoz kun la ĉefa temo de Genro-Egaleco..

Aŭskulta Servo (Aŭskultoservo) - servo per kiu oni aŭskultas homojn por helpi ilin alfronto privatajn problemojn dum niaj renkontiĝoj..

Diskutrondo pri feminismo tutmonde dum la virtualaj renkontiĝoj en 2020 - Feminismo Tutmonde, Konsentkulturo kaj Ipa Fier-Tago.

Glumarkoj pri konsentkulturo kaj aliaj agadoj de la branĉo pri Genra Egaleco de la komisiono pri egaleco de TEJO.



Seksisma lingvuzo povas esti:

- Subteno de damaĝaj stereotipoj
- Subteno de malegaleco
- Perforto en formo de perforta lingvuzo

LINGVOUZO EGALAS KONDUTON



Kion ni povas fari?

- Uzu genro-neŭtralan lingvaĵon
- Uzo de lingvo por reliefigi malegalecojn
- Evitu kaj defiu stereotipojn

**LINGVOUZO
GRAVAS**



Lingvo povas kunporti negativajn sociajn mesaĝojn, sed ĝi ankaŭ povas helpi meti genro-rilatajn temojn en la tagordon. Taŭga lingvouzo povas videbligi genron en ĉiutagaj aferoj, sed ŝanĝi lingvon ne sufiĉas.

Gravas enmeti la temojn rilatajn al knabinoj kaj virinoj en la tagordon - kaj lingvo estas unu el la iloj, kiujn ni povas uzi por videbligi tiujn aferojn.

KONKLUDO



Allwood, Gill. Horizontal policy coordination and gender mainstreaming: The case of the European Union's Global Approach to Migration and Mobility, *Women's Studies International Forum* 48 (2015) 9–17

Hafner-Burton, Emilie; Pollack, Mark (2009): *Mainstreaming gender in the European Union: Getting the incentives right*, *Comparative European Politics* (2009) 7, 114–138.

Kantola, Johanna (2010): *Gender and the European Union*, New York: Palgrave Macmillan

David, Maxine; Guerrina, Roberta, Gender and European external relations: Dominant discourses and unintended consequences of gender mainstreaming. *Women's Studies International Forum* 39 (2013) 53–62 <https://doi.org/10.1016/j.wsif.2012.06.005>

Lang, Sabine *NGOs, Civil Society, and the Public Sphere* (2013) Cambridge University Press

Lovecy, Jill. *Gender Mainstreaming and the Framing of Women's Rights in Europe: The Contribution of the Council of Europe* (2002) Feminist Legal Studies

Mazey, Sonia (2001): *Gender Mainstreaming in the EU: Principles and Practice*, London: Kogan Page

McLaren, Margaret A. (2017) *Decolonizing Rights: Transnational Feminism and Women's rights as Human Rights*. Decolonizing Feminism: Transnational Feminism and Globalization, London.

Pascoët, Julie and Chander, Sarah. "Women's rights in the EU: a privilege for some women?" Open Democracy free thinking for the world. (2017) www.opendemocracy.net/can-europe-make-it/julie-pasco-t-sarah-chander/women-s-rights-in-eu-privilege-for-some-women



**ĈU VI LERNIS ION
NOVAN?**

**RESPONDU LA
KVIZON!**



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

tejo.org